

MITOJ DE LA MALNOVA IZRAELO

EDUARD
PETIŠKA

PŘÍBĚHY STARÉHO IZRAELE

EDUARD
PETIŠKA



MARTIN

EDUARD PETIŠKA

MITOJ DE LA MALNOVA IZRAELO

tradukis kaj aranĝis Vladimír Türk

kiel videolibro:

<https://1url.cz/@MITOJ.IZRAELO>

© CC BY-SA 4.0

<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0>

EDUARD PETIŠKA

PŘÍBĚHY STARÉHO IZRAELE

jako videokniha:

<https://1url.cz/@MITOJ.IZRAELO>

Verkisto, poeto kaj tradukisto Eduard Petiška estas aŭtoro de pli ol naŭdek titoloj, alparolanta jam la kvinan generacion, de legantoj infanaĝaj ĝis la supozeble saĝa maljuneco. Ĉiuj konas la Legolibron de Martínek, aŭ la figureton Krteček (Talpeto), kiu, kiel maskoto de la astronauto Andrew Feustel, ankaŭ vizitis la kosmon en 2011.

La libroj de Petiška tradukitis en pli ol dudek lingvojn, inter aliaj ankaŭ en Esperanton – en 2024 aperis Malnovaj grekaj mitoj (trad. H.G. Kaiser) kaj Golemo kaj aliaj judaj mitoj de la malnova Prago (trad. V. Türk), okaze de cent jaroj de la naskiĝo (14.5.1924 – 6. 6 1987).

Unu sekcio de lia verkaro enhavas modernan prilaboron de fabeloj, legendoj kaj rakontoj de diversaj kulturaj areoj; jen rakontoj el antikva Egiptio, Mezopotamio, Izraelo, malnovaj grekaj fabeloj kaj legendoj, arabaj rakontoj pri mil kaj unu noktoj, malnovpragaj judaj legendoj kaj ege sukcesa prezento de malnovaj ĉeĥaj mitoj.

Mitoj de la malnova Izraelo apartenas al tiuj plej allogaj el la verkoj de ĉi tiu serio.

Spisovatel, básník a překladatel Eduard Petiška je autorem více než devadesáti titulů, oslovující už pátou generaci čtenářů od dětství až do údajně moudrého stáří. Martínkovu čítanku nebo Krtečka, který se jako maskot astronauta Andrewa Feustela v r. 2011 podíval i do vesmíru, zná každý.

Petiškovy knihy byly přeloženy do více než dvaceti jazyků, mezi jinými i do esperanta – v r. 2024 vyšly Staré řecké báje (přel. H.G.Kaiser) a Golem a jiné židovské pověsti ze staré Prahy (přel. V. Türk), u příležitosti stého výročí narození (14.5.1924 – 6. června 1987).

Jeden oddíl autorovy tvorby obsahuje moderní zpracování bájí, pověstí a příběhů různých kulturních oblastí; vidíme zde příběhy ze starého Egypta, Mezopotámie, Izraele, staré řecké báje a pověsti, arabské příběhy tisíce a jedné noci, staropražské pověsti i mimořádně úspěšné vyprávění starých dějů země české.

Příběhy starého Izraele patří k nejpoutavějším dílům celé této řady.

ENHAVO

01 KREO DE LA MONDO	4
02 KAINO KAJ HABELO	10
03 DILUVO	13
04 BABELA TURO	17
05 ABRAHAMO KAJ ISAAKO	20
06 SODOMO KAJ GOMORA	27
07 JOZEFO KAJ LIAJ FRATOJ	31
08 MOSEO	40
09 SAMSONO	58
10 SAŬLO KAJ DAVIDO	63
11 SALOMONO	75
12 JONAO	87
13 JUDITA KAJ HOLOFERNO	91
14 FINO DE JERUZALEMO	96

OBSAH

01 STVOŘENÍ SVĚTA	4
02 KAIN A ÁBEL	10
03 POTOPA	13
04 BABYLÓNSKÁ VĚŽ	17
05 ABRAHÁM A IZÁK	20
06 SODOMA A GOMORA	27
07 JOSEF A BRATŘI JEHO	31
08 MOJŽÍŠ	40
09 SAMSON	58
10 SAUL A DAVID	63
11 ŠALAMOUN	75
12 JONÁŠ	87
13 JUDITA A HOLOFERNES	91
14 KONEC JERUZALÉMA	96

KIEL ESTIS KREITA LAŬ LA IZRAELIDOJ
LA MONDO KAJ ĈIUJ ĜIAJ MIRINDAĴOJ
KAJ KIEL LA UNUAJ HOMOJ RICEVIS DONACE
PARADIZON KAJ KIEL ILI PERDIS ĜIN

En la komenco de ĉio estis la Eternulo, la granda kaj sola dio de Izraelo. Lia spirito ŝvebis super la akvoj, ĉar la mondo estis akvo kaj la akvo estis la mondo.

La Eternulo prenis sian helan mantelon kaj etendis ĝin kiel tapiŝon. Tiel li kreis la ĉielon. La ĉielo kreskis kaj kreskis ĉiudirekte, ne estis por ĉi fino. Jen la Eternulo ordonis:

"Haltu!"

Kaj la ĉielo haltis kaj ĉesis kreski.

Tiam la Eternulo levis la neĝon, kiu kuŝis sub lia trono, etendis sian manon super la dezertajn akvojn, kaj verŝis la neĝon supren.

"Iĝu tero," li ordonis.

Kaj la akvo firmiĝis kaj fariĝis tero. El la akvo naskiĝis neĝo kaj el la neĝo tero. Ankaŭ la tero kreskis kaj kreskis en ĉiuj direktoj kaj estis senfina. Jen la Eternulo ordonis al la tero ĉesi kreski kaj difinis ĝiajn limojn.

En la dua tago, la Eternulo kreis la firmamenton kaj anĝelojn, flugilhavajn estaĵojn, ke ili servu al li. Li ankaŭ kreis duoblan fajron. Por unu fajro li difinis la lokon sur la tero kaj la alian li metis en la submondon. Li asignis al la supraj akvoj la spacon super la ĉielo kaj al la malsupraj akvoj sub la ĉielo. Se li ne apartigus la akvojn, ili englutus la mondon.

En la tria tago, la tero ankoraŭ similis al dezerta ebenaĵo, kaj ebena surfaco kovris larĝfore ĝian vizaĝon. Kaj la Eternulo ordonis, ke la akvoj kolektiĝu, kaj jen leviĝis el la akvo montetoj, el la akvoj kreskantis montoj kaj inter ili aperis valoj.

JAK VZNIKL PODLE IZRAELCŬ
SVĚT A VŠECHNY JEHO DIVY
A KTERAK PRVNÍ LIDÉ DOSTALI DAREM
RÁJ A JAK HO POZBYLI

Na počátku všeho byl Jahve, veliký a jediný izraelský bůh. Jeho duch se vznášel nad vodami, neboť svět byl voda a voda byla svět.

Jahve vzal svůj jasný plášť a rozestřel jej, jako by rozprostřel koberec. Tak stvořil nebesa. Nebesa rostla a rostla do všech stran, nebylo jim konce. Tu Jahve rozkázal:

„Zastavte se!“

A nebesa se zastavila a přestala růst.

Potom zvedl Jahve sněh, který ležel pod jeho trůnem, vztáhl dlaně nad pusté vody a nasypal sněh na hladinu.

„Staň se zemí,“ přikázal.

A voda ztuhla a stala se zemí. Z vody se zrodil sněh a ze sněhu země. Také země rostla a rostla na všechny strany a byla bez konce. Tu rozkázal Jahve, aby země přestala růst a určil jí hranice.

Druhého dne stvořil Jahve nebeskou klenbu a anděly, okřídlené bytosti, aby mu sloužily. Stvořil i dvojí oheň. Jednomu ohni vykázal místo na zemi a druhý uložil v podsvětí. Horním vodám určil prostor nad oblohou a dolním pod oblohou. Kdyby byl neoddělil vody od sebe, pohltily by svět.

Třetího dne se země ještě podobala pusté pláni a rovná hladina pokrývala široko daleko její tvář. I poručil Jahve vodám, aby se shromáždily, a hle, z vody vyrůstaly kopce, hory si razily cestu vzhůru a mezi nimi se objevila údolí.

La akvoj defluantis de la tera dorso, ili konverĝis en ravinoj kaj rifuĝis en la profundo. La akvoj kuniĝis por formi la maron. Tamen, la malsataj ondoj baldaŭ leviĝis kaj volis regi la montetojn kaj deklivojn perforte. Sed la Eternulo haltigis la antaŭirantan maron, mezuris ĝin kaj ĉirkaŭis ĝin per sablo, kiel homo baras sian vinbergardenon. Kiam ajn la maro leviĝas kaj vidas la sablon antaŭ si, ĝi retiriĝas. Akvoj elfluis el la profundo, por provizi akvon por la tuta kreitaro, kiu loĝas sur la tero. El la profundo la nuboj ĉerpis akvon por pluvo. Kaj la Eternulo starigis al la nuboj, kien ili portu sian pluvon. En la tria tago li ankaŭ malfermis la pordegojn de la ĝardeno Eden kaj prenis de tie semojn de herboj, plantoj kaj arboj kaj disĵetis ilin sur la teron. La semoj ĝermis kaj devastigis riĉan tablon por ĉiuj vivantaj estaĵoj.

En la kvara tago, la Eternulo kreis du lumojn, unu similan al la alia, ambaŭ samgrandajn kaj egale brilantajn. Apenaŭ li kreis ilin, la lumoj komencis kvereli, kiu estas pli granda kaj pli brilas. La kverelo ne ĉesis kaj la kriadon aŭdis la Eternulo. Li malgrandigis unu lumon kaj starigis la grandan lumon por regi la tagon kaj la malgrandan por regi la nokton. Do la suno kaj la luno ekiris sian vojaĝon. Fine la Eternulo kreis la stelojn.

En la kvina tago li vivigis la akvon per fiŝoj. Ankaŭ diversaj birdoj kaj ĉiaspecaj akridoj leviĝis el la akvoj, kaj pepado de la birdoj kaj zumado de la insektoj unuafoje sonis en la aero. De ĉiu speco de fiŝoj, birdoj kaj aliaj kreitaĵoj la Eternulo kreis po paro, por ke ili multiĝu kaj ilia speco ne pereu. En la kvina tago la Eternulo enspiris la vivon ankaŭ al grandega drako Levjatan kaj montris al ĝi lokon en la plej profunda profundo de la maro. De tie Levjatan levas la kapon kaj snufas, ĝis la maro ĉirkaŭ ĝi bolas. Ĉi tie falas timego je ĉiuj enondaj loĝantoj kaj tremas eĉ la plej grandaj kaj furiozaj predantoj.

En la sesa tago la Eternulo kreis la bestojn. Ŝafoj kaj kaproj mordetis la herbon en la herbejoj, cervoj kaj cervinoj eliris el la arbaro por paŝti sin. En tiu tago, la Eternulo kreis ankaŭ la plej grandan el ĉiuj bestoj, grandegan bovon, kiu satiĝas ĉiutage per herbo el mil herbaj montoj. Kio estas forpa tita en tago, kreskas dum la nokto,

Vody stékaly ze hřbetu země, sbíhaly se ve stržích a uchylovaly do hlubin. Vody se spojily a vzniklo moře. Hladové vlny se vsak brzy vzedmuly a chtěly násilím ovládnout stráně a svahy. Ale Jahve zarazil postupující moře, přeměřil je a obklopil písekem, jako člověk oplocuje svou vinici. Kdykoli se moře vzbouří a spatří před sebou písek, ucouvne. Z hlubin vytryskly vody, aby se mělo kde napájet veškeré tvorstvo, které zabydlí zemi. Z hlubin čerpala oblaka vodu pro deště. A Jahve určil oblakům, kam mají donést svůj déšť. Třetího dne otevřel také brány rajské zahrady Edenu a vybral odtamtud semena trávy, rostlin a stromů a rozsel je po zemi. Semena vzkličila a prostřela bohatý stůl pro všechny živé tvory.

Čtvrtého dne stvořil Jahve dvě světla, jedno jako druhé, obě stejně veliká a stejně zářící. Sotva je stvořil, začala se světla přít, které z nich je větší a které více září. Hádka neustávala a křik uslyšel Jahve. Zmenšil jedno světlo a velkému světlu určil, aby vládlo dni, a malému, aby vládlo noci. Tak se vydaly na svou pouť slunce a měsíc. Nakonec stvořil Jahve hvězdy.

Pátého dne oživil vody rybami. Z vod povstalo i rozličné ptactvo a všelijaké kobyly a ovzduším poprvé zaznělo ptačí cvrlikání a bzukot hmyzu. Od každého druhu ryb, ptáků a ostatních tvorů stvořil Jahve po páru, aby se množili a jejich rod nevyhynul. Pátého dne vdechl Jahve život i obrovskému draku Leviatanu a vykázal mu místo v nejhlubších hloubkách moře. Odtud Leviatan pozvedá hlavu a supí, až moře kolem něho vře. Tu padne převeliký strach na všechny obyvatele vln a chvějí se i největší a nejzpuštěnější dravci.

Šestáho dne stvořil Jahve zvířata. Na lukách okusovaly trávu ovce a kozy, z lesů vyšel na pastvu jelen a laň. Toho dne stvořil Jahve také největší ze všech zvířat, ohromného býka behemota, který se denně sytí trávou z tisíce travnatých hor. Co za den spase, přes noc narůstá,

kaj matene la montoj verdas denove. Ĝi trinksatiĝas per akvo el la rivero Jordano, ĝi baras la fluon de la rivero per sia faŭko kaj gluthaltigas la tutan riveron. La Eternulo kreis kaj por leviatano kaj por behemoto inkunulinojn. Sed se tiaj gigantaj bestoj havus idojn, ilia monstra raso detruus la teron. Tial la Eternulo mortigis la femalojn de la grandegaj bestoj kaj saligis ties viandon, por ke ĝi estu freŝa, ĝis post la mondfino ĉiuj virtuloj sidiĝos al granda festeno.

En ses tagoj kreiĝis la mondo kaj la sep ĉieloj super ĝi. Unu ĉielo super la alia. Ĉiuj ĉieloj estas kunligitaj per longaj eskaloj. Kiu volus supreniri de la tero la unuan ĉielon, ascendus kvincent jarojn. La superba trono de la Eternulo leviĝas nur en la lasta, la sepa ĉielo. Ĉi tie staras trezorejo de la altvaloraj donacoj de la vivo kaj ĉi tie ankaŭ estas konservita la mirakla roso, per kiu foje la Eternulo vekos la mortintojn, kiam ĉi tiu mondo finiĝos.

Fine venis la momento, kiam la Eternulo decidis krei homon — estaĵon, kiu similus al li. Li kreis la tutan mondon per sia vorto, sed la homon li kreis propramane. Li knedis lin el argilo miksitaj kun akvo, kvazaŭ li knedus paston el faruno kaj akvo. Al la homa figuro li enspiris vivon. La anĝeloj ĉirkaŭis la unuan homon kaj miris:

"Kiu estas ĉi tiu, la viro, kiun vi kreis?"

La Eternulo respondis al ili:

"Lia saĝeco estas pli granda ol via."

Tiam li alvokis ĉiujn bestojn kaj birdojn, kaptis ilin sur sia ungo kaj portis ilin antaŭ la anĝelojn. Li montris al ili la bestojn kaj demandis:

"Kiel nomiĝas tiuj bestoj?"

Sed la anĝeloj ne sciis.

La Eternulo venigis la homon kaj demandis lin pri la bestonomoj. Kaj la homo konis ĉiujn bestojn laŭnome. Li nomis virbovon, ĉevalon, azenon, kamelon, aglon kaj leonon. Tiel, kiel la Eternulo montrantis ilin.

"Kaj kiel nomiĝas vi?" demandis la Eternulo.

"Vi knedis min el argilo," diris la viro, "tial mi devus esti nomita Adamo."

a zrána jsou hory opět zelené. Napájí se vodou z řeky Jordánu, zastaví tlamou tok řeky a polkne naráz celý proud. I leviatanu, i behemotovi stvořil Jahve družky. Ale kdyby měla tak obrovitá zvířata mladé, zničil by jejich nestvůrný rod zemi. Proto porazil Jahve samice obrovských zvířat a jejich maso nasolil, aby bylo čerstvé, až po konci světa zasednou všichni spravedliví k veliké hostině.

V šesti dnech vznikl svět a nad ním sedm nebes. Jedno nebe nad druhým. Všechna nebe jsou mezi sebou spojena dlouhými žebříky. Kdo by chtěl vystoupit ze země do prvního nebe, stoupal by pět set roků. Nádherný Jahvův trůn se tyčí až v posledním, sedmém nebi. Zde stojí pokladnice vzácných darů života a zde je uložena i zázračná rosa, kterou jednou Jahve probudí ty, kdo zemřeli, až skončí tento svět.

Konečně nadešla chvíle, kdy se Jahve rozhodl stvořit člověka — bytost, která by se mu podobala. Celý svět stvořil svým slovem, ale člověka udělal vlastníma rukama. Uhnětl ho z hlíny, smísené s vodou, jako by hnětl těsto z mouky a vody. Lidské postavě vdechl život. Andělé obstoupili prvního člověka a divili se:

„Kdo je to, ten člověk, kterého jsi stvořil?“

Jahve jim odpověděl:

„Jeho moudrost je větší než vaše.“

Pak svolal všechna zvířata a ptáky, zachytil je na svém nehtu a přinesl je před anděly. Ukazoval jim zvířata a ptal se:

„Jakpak se ta zvířata jmenují?“

Ale andělé nevěděli.

Jahve dal přivést člověka a zeptal se ho na jména zvířat. A člověk znal všechna zvířata jménem. Jmenoval býka, koně, osla, velblouda, orla i lva. Tak, jak na ně Jahve ukazoval.

„A jak se jmenuješ ty?“ zeptal se ho Jahve.

„Uhnětl jsi mne z hlíny,“ řekl člověk, „měl bych se proto jmenovat Adam.“

Kaj la unua viro estis nomita Adamo - "knedita el argilo." Li loĝis meze de la rava ĝardeno Edeno, kaj la Eternulo instruis al li multajn utilajn aferojn. Li ankaŭ montris al li, kiel akiri fajron. Li metis du ŝtonojn en liajn manojn, ke li kunfrotu ilin kaj batfrotante li ricevu fajrerojn kaj el la fajreroj flamon.

Adamo vivis en paradizo, sed li estis sola kaj malgaja. Kaj la Eternulo rigardis lin el la ĉielo kaj pensis: Ne estas bone por la homo esti sola. Li denove etendis la manon al la argilo kaj faris el ĝi virinon. Li enspiris vivon al la virino, nomis ŝin Lilith, kaj sendis ŝin al Adamo, por ke ŝi vivu kun li en la paradizo. Ne daŭris longe kaj Lilith kun Adamo ekkverelis. Ŝi ne volis submetiĝi al lia volo.

"Vi estas la sama kiel mi," ŝi diris, "la Eternulo faris nin ambaŭ el la sama argilo."

La kvereloj de Lilith kun Adamo ne havis finon. Iun tagon ĝenita Lilith eldiris la sekretan kaj potencon veran nomon de Dio kaj leviĝis en la aeron kaj malaperis. Adamo denove estis sola kaj pli soleca ol antaŭe.

Do li turnis sin al la Eternulo.

"Ho, la mondreganto," li diris, "la virino, kiun vi donis al mi, malaperis. Kaj tamen ĉiuj estaĵoj, al kiuj vi enspiris vivon, vivas duope."

La Eternulo sendis Adamon en profundan dormon. Poste li elprenis la ripon de Adamo kaj kreis el ĝi novan virinon. Li ne kreis ŝin el la kapo, por ke ŝi fiere ne levu la kapon, li ne kreis ŝin el la okulo, por ke ŝi ĉie ne spionu per la okuloj, nek el la orelo, por ke ŝi ne aŭskultu iun ajn, li ne kreis ŝin el la buŝo de Adamo, por ke ŝi ne parolu multe, sed li kreis ŝin el ripo, el ostoj, kiu estas haŭtkovrita eĉ kiam oni estas nuda. La Eternulo vivigis la virinon kaj sendis ŝin al Adamo kun mil anĝeloj, kun sono de harpoj kaj violonoj, kun muziko kaj kantoj. Tiam li invitis Adamon kaj lian edzinon al festeno. Servistaj anĝeloj kuiris por ili viandon kaj malvarmigis vinon. Kiam vidis la honorojn, kiujn la Eternulo montris al la unuaj homoj la serpento, ĝia envio ne koncedis al li kvieton. La serpento estis en tiuj antikvaj tempoj la plej ruza besto kaj ĝi ankoraŭ ne havis sian nunan formon. Ĝi havis krurojn kaj estis rekta kiel tigo de kano. Ĝi cerbumis, kontraŭ kiu el la unuaj homoj uzi trukon.

I dostal první člověk jméno Adam — „z hlíny uhnětený“. Žil uprostřed rozkošné rajské zahrady v Edenu a Jahve ho naučil mnoha užitečným věcem. Ukázal mu také, jak si má opatřit oheň. Vložil mu do rukou dva kameny, aby je třel o sebe a křesáním získal jiskry a z jisker plamen.

Adam žil v ráji, ale byl sám a bylo mu smutno. Jahve na něho shlížel z nebes a uvažoval: Není dobře člověku samotnému. Sáhł znovu po hlíně a vytvořil z ní ženu. Vdechl ženě život, dal jí jméno Lilith a poslal ji k Adamovi, aby s ním bydlila v ráji.

Netrvalo dlouho a Lilith se pustila s Adamem do hádky. Nechtěla se podrobit jeho vůli.

„Jsi stejný jako já,“ říkala, „Jahve nás oba uhnětl ze stejné hlíny.“

Hádky Lilith s Adamem neměly konce. Jednoho dne pronesla rozmrzelá Lilith tajné a mocné pravé jméno boha a vznesla se do ovzduší a zmizela. Adam byl opět sám a osamělejší než dříve.

I obrátil se k Jahvovi.

„Ó, pane světa,“ řekl, „žena, kterou jsi mi dal, odešla. A přece všichni tvorové, kterým jsi vdechl život, žijí ve dvojicích.“

Jahve seslal na Adama hluboký spánek. Ve spánku vyňal Adamovi žebro a z žebra stvořil novou ženu. Nestvořil ji z hlavy, aby nepozvedala pyšně svou hlavu, nestvořil ji z oka, aby neslídila všude očima, ani z ucha, aby nepopřávala kdekomu sluchu, nestvořil ji z Adamových úst, aby příliš nemluvila, ale stvořil ji z žebra, z kosti, která je přikryta kůží, i když je člověk nahý. Jahve dal ženě život a poslal ji k Adamovi s tisícem andělů za zvuků harf a houslí, s písněmi a zpěvy. Pak pozval Adama a jeho ženu na hostinu. Sloužící andělé pro ně pekli maso a chladili jim víno. Pocty, které prokazoval Jahve prvním lidem, spatřil had a závist mu nedopřávala klidu. Had byl za těch dávných časů nejlstivější zvíře a neměl ještě svou dnešní podobu. Měl nohy a byl vzpřímený jako stéblo rákosy. Rozvažoval, proti komu z prvních lidí použít lsti.

Se mi alparolos la viron, li pensis, li ne aŭskultos min. Estas malfacile movi la menson de viro. Mi preferos paroli kun la virino. Mi certas, ke ŝi aŭskultos min kaj estas pli facile persvadi ŝin.

La serpento elserĉis la virinon dum ŝi promenadis sola en la paradizo kaj alparolis ŝin:

"Ĉu estas vere, ke la Eternulo malpermesis al vi homoj manĝi la frukton?"

"Ni povas pluki fruktojn el ĉiuj arboj," diris la virino, "nur fruktojn el la arbo de la scio pri bono kaj malbono, kiu staras meze de la paradizo, ni pluki ne rajtas."

"Kaj ĉu vi scias, kial la Eternulo malpermesis tion al vi?" diris la serpento. "Ĉar li mem manĝis la fruktojn de tiu arbo antaŭ ol krei la mondon. Li timas, ke vi ne fariĝu liaj egaluloj, ke vi ne povu fari tion, kion li. Tial li malpermesis al vi manĝi la frukton de la arbo en la mezo de la paradizo." Kaj la serpento alproksimiĝis al la malpermesita arbo kaj tuŝis ĝin. "Rigardu," ĝi vokis al la virino, "mi tuŝis la arbon kaj nenio okazis al mi."

La virino, konfuzita de la serpenta tentado, ĝia deloga parolo, plukis la fruktojn de la arbo de la scio pri bono kaj malbono, manĝis ilin kaj alportis ilin al Adamo, kaj ankaŭ Adamo manĝis. Apenaŭ la unuaj homoj manĝis la malpermesitan frukton, scio malfermis iliajn okulojn. Ili rekonis, ke ili estas nudaj kaj komencis kovri sian nudecon per figaj folioj.

La Eternulo, kiu vidis ĉion el sia sepa ĉielo, venis al la pordego de Edeno, sed Adamo kun la virino kaŝis sin antaŭ li en arbustoj.

"Kie vi estas, Adamo? vokis la Eternulo.

"Mi aŭdis vin veni," respondis Adamo, "kaj mi kaŝis min en la arbustoj. Mi timis, ĉar mi estas nuda."

"Kiu diris al vi, ke vi estas nuda? Vi manĝis la frukton de la arbo de scio, kiun mi malpermesis al vi."

Kaj la Eternulo venigis la unuajn homojn antaŭ sian juĝon. Unue li demandis Adamon:

"Kial vi manĝis el la arbo de scio? Ĉu mi ne malpermesis al vi manĝi ĝiajn fruktojn? Ĉu mi ne postulis obeon de vi?"

Jestliĝe oslovím muže, říkal si, neposlechne mě. Je těžké pohnout myslí muže. Raději promluví s ženou. Jistě mě vyslechne a snáže ji přemluví.

Had vyhledal ženu, když se procházela sama v ráji, a oslovil ji: „Je pravda, že vám, lidem, zakázal Jahve jíst ovoce?“

„Můžeme trhat ovoce ze všech stromů,“ řekla žena, „jenom ze stromu poznání dobra a zla, který stojí uprostřed ráje, ovoce trhat nesmíme.“

„A víš, proč vám to Jahve zakázal?“ řekl had. „Protože sám jedl ovoce toho stromu, než stvořil svět. Bojí se, abyste se mu nestali rovni, abyste nedovedli to, co on. Proto vám zakázal jíst ovoce ze stromu uprostřed ráje.“ A had se přiblížil k zakázanému stromu a dotkl se ho. „Podívej,“ zavolal na ženu, „dotkl jsem se stromu, a nic se mi nestalo.“

Žena, zmatená lákáním hada, jeho úlisnou řečí, utrhla plody stromu poznání dobra a zla, jedla je a donesla Adamovi a Adam jedl také. Sotva první lidé snědli zakázané ovoce, poznání jim otevřelo oči. Poznali, že jsou nazí, a začali svou nahotu přikrývat fíkovými listy.

Jahve, který ze svého sedmého nebe všechno viděl, sestoupil k bránám Edenu, ale Adam s ženou se před ním ukryli do houštiny.

„Kde jsi, Adame?“ zvolal Jahve.

„Slyšel jsem, že přicházíš,“ odpověděl Adam, „a skryl jsem se do křoví. Báł jsem se, protože jsem nahý.“

„Kdo ti řekl, že jsi nahý?“ otázal se Jahve. „Jedl jsi ovoce ze stromu poznání, které jsem ti zakázal.“

A Jahve postavil první lidi před svůj soud. Nejdříve se zeptal Adama:

„Proč jsi jedl ze stromu poznání? Cožpak jsem ti nezakázal, abys jeho ovoce jedl? Nežádal jsem od tebe poslušnost?“

"Ho, reganto de la mondo," diris Adamo, "la virino, kiun vi kreis por mi, alportis frukton, kaj mi manĝis."

"Kial vi deŝiris la malpermesitan frukton?" ekkriis la Eternulo al la virino. "La serpento trompis min," diris la virino.

La Eternulo vokis la serpenton.

"Ĉar vi faris tion," li diris al la serpento, "vi rampos sur via ventro dum via tuta vivo, vi manĝos argilon kaj polvon dum via tuta vivo, kaj ĉiuajn sep jarojn vi formetos vian haŭton en granda doloro." Kaj la Eternulo prenis la serpenton kaj detranĉis ĝiajn kruojn. "Via lango kaŭzis vian falon," li diris, "ĉiuj homoj sciu por ĉiam kaj eterne, de kie venas malbona parolo kaj kalumnio," kaj la Eternulo kaptis la serpenton kaj duonigis ĝian langon. Poste li malbenis la serpenton kaj forpelis ĝin el la paradizo.

"Mi multigos viajn suferojn," diris la Eternulo al la virino, "vi ekkonos doloron kaj zorgojn kaj viro regos super vi."

"Al vi," li ekparolis al Adamo, "malbenita estos la tero, kiun vi kultivos. Via rikolto estos dornoj kaj fiherboj, kaj vi manĝos panon en la ŝvito de via vizaĝo, ĝis vi mem revenos en la teron. Polvo vi estas kaj al polvo vi revenos." Poste la Eternulo donis al Adamo kaj al lia edzino vestojn el felo kaj forpelis ilin el la paradizo. Ĉe la pordego de Edeno li gardigis kerubojn, anĝelojn kun eltiritaj flamantaj glavoj. Ili gardis la vojjon al la arbo de vivo.

Kiu gustumos la frukton de la arbo de vivo, tiu vivos eterne. Kaj nenio pli mankis al Adamo por simili Dion. Li estis kreita laŭ lia bildo kaj kapablis ekkoni bonon kaj malbonon.

Sed la vivo sur la tero, al kiu la Eternulo kondamnis homojn, estas mortfina. Finiĝis la tempo de paradiza feliĉo, kiam la tero kaj la arboj senlabore ofertis siajn fruktojn al homoj, kaj la homo konis nek mankon, nek penon, nek doloron. Li devis multe labori kaj ofte rikoltis zorgon kaj malĝojon. Vivo estis mezurita al homoj kaj povis daŭri nur en iliaj infanoj.

Tiam Adamo nomis sian edzinon Chavá. La hebrea nomo kaŝas en si ŝian mision. Ŝi fariĝis la vivodona patrino de la homa raso. Ni konas ŝin sub la nomo Eva.

„Ó pane světa,“ promluvil Adam, „žena, kterou jsi mi stvořil, přinesla ovoce a já jedl.“

„Proč jsi trhala zakázané ovoce?“ zvolal Jahve na ženu.

„Had mě obelstil,“ řekla žena.

Jahve dal přivolat hada.

„Protože jsi to učinil,“ řekl hadovi, „budeš se celý život plazit po břiše, budeš se sytit hlínou a prachem po všechny dny svého života a každých sedm let svlékneš kůži za hrozných bolestí.“ A Jahve vzal hada a usekal mu nohy. „Tvůj jazyk způsobil tvůj pád,“ řekl, „ať tedy na věky věků všichni vědí, kde mají původ zlá řeč a pomluva.“ A Jahve uchopil hada a roztrhl mu jazyk na dvě poloviny. Pak hada proklel a vyhnal ho z ráje.

„Rozmnožím tvé útrapy,“ řekl Jahve ženě, „poznáš bolest i starost a muž ti bude panovat.“

„Tobě,“ promluvil k Adamovi, „bude zlořečena země, kterou budeš obdělávat. Tvá úroda bude trní a plevel a v potu tváře budeš jíst chléb, dokud se sám do země nevrátíš. Prach jsi a v prach se navrátíš.“

Pak dal Jahve Adamovi a jeho ženě oděv z kůže a vyhnal je z ráje. Před brány Edenu postavil na stráž cherubíny, anděly s obnaženými plamennými meči. Střežili cestu ke stromu života.

Kdo okusí ovoce ze stromu života, bude žít věčně. A nic víc Adamovi nechybělo, aby se podobal bohu. Byl stvořen k jeho obrazu a dovedl poznávat dobré a zlé.

Ale život na zemi, k němuž Jahve lidi odsoudil, je smrtelný. Skončil čas rajske blaženosti, kdy země i stromy nabízely lidem své plody bez práce a člověk neznal nedostatek, ani námahu, ani bolest. Musil těžce pracovat a často sklízel starost a zármutek. Život byl lidem odměřen a mohl pokračovat jenom v jejich dětech.

Tehdy dal Adam své ženě jméno Chavá. Hebrejské jméno skrývá v sobě její poslání. Stala se matkou dávající život lidskému pokolení. My ji známe pod jménem Eva.

HOMO UNUAFOJE MORTIGOS HOMON KAJ AKCEPTOS PUNON POR TIO

Al Adam kaj lia edzino naskiĝis du filoj. La virino nomis la pli maljunan knabon Kaino kaj la pli junan Habelo, Hebel en la hebrea. Kiam la fratoj maturiĝis, ĉiu el ili elektis laboron. Kaino fariĝis farmisto, plugis, semis kaj rikoltis. Habelo paŝtis ŝafojn, prizorgis sian gregon, kaj kiam venis la tondotempo, li tondis de la ŝafoj la lanon.

Ili laboris diligente la tutan jaron. Kaino rikoltis la kultivaĵojn el la kampoj kaj la grego de Habelo multiĝis. Alproksimiĝis la tempo, kiam estis necese alporti bruloferon al la Eternulo.

La ruza Kaino metis sur la oferŝtonon la plej malbonan, kio elkreskis al li. La plej bonan parton de la rikolto li konservis por si. La seninsida Habelo metis sur la oferŝtonon la plej grasajn ŝafojn.

La Eternulo ĝojis pri la ofero de Habelo kaj sendis el la ĉielo fajron, kiu ekbruligis la oferon de Habelo kaj konsumis ĝin. La oferon de Kaino li ne akceptis.

Kaino vidinte, ke la fumo de la ofero de Habelo leviĝas al la ĉielo kaj lia ofero ne estis rimarkita de la Eternulo, enviis al Habelo. Kaj la envio de Kaino kreskantis de tago al tago, kaj Kaino komencis malami sian fraton kaj li sopiris pri preteksto ataki kaj mortigi sian fraton.

Iun tagon la du fratoj eliris post sia laboro, kaj dum Kaino plugis, Habelo paŝtis la ŝafojn proksime. Kelkaj ŝafoj el la grego de Habelo envagis la plugitan kampon de Kaino kaj Kaino eligis krion. Li ĵetis sin kontraŭ Habelo kun kunpremitaj pugnoj kaj kolere kriis:

"Kion vi pensas? Ĉu mi prilaboras la kampojn por viaj ŝafoj?"

"Ne koleru," respondis Habelo trankvile, "la ŝafoj ne faris al vi malbonon. Vi profitas de miaj ŝafoj. Ĉu vi ne manĝas ilian viandon? Ĉu vi ne vestas vin per ilia lano?"

ČLOVĚK POPRVÉ ZABIJE ČLOVĚKA A PŘIJME ZA TO TREST

Adamovi a jeho ženě se narodili dva synové. Žena dala staršímu chlapci jméno Kain a mladšímu Ábel, hebrejsky Hebel. Když bratři dorostli, vybral si každý z nich zaměstnání. Kain se stal rolníkem, oral, sel a sklízel. Ábel pásł ovce, staral se o své stádo, a když nadešel čas stříže, stříhal ovcím vlnu.

Celý rok pilně pracovali. Kain sklídil úrodu z polí a Ábelovo stádo se rozmnožilo. Přiblížila se chvíle, kdy bylo třeba přinést Jahvovi zápalnou oběť.

Lstivý Kain položil na obětní kámen, co se mu urodilo nejhoršího. Nejlepší část úrody ukryl sám pro sebe. Nezáłodný Ábel položil na obětní kámen nejuťnějši ovce.

Jahve se zaradoval nad Ábelovou obětí a poslal z nebe oheň, který Ábelovu oběť zažehl a strávil ji. Kainovu oběť nepřijal.

Když Kain uviděl, že dým z Ábelovy oběti stoupá k nebi a jeho oběti si Jahve nevšiml, záviděl Ábelovi. A Kainova závist rostla den ze dne a Kain začal bratra nenávidět a toužil po zámince, aby mohl bratra napadnout a zabít.

Jednoho dne vyšli oba bratři po své práci, a zatímco Kain oral, Ábel pásł nedaleko ovce. Několik ovcí z Ábelova stáda se zatoulalo na Kainovo oraniště a Kain spustil křik. Se zaťatými pěťmi se vrhl proti Ábelovi a zlostně vykřikoval:

„Co si myslíš? Obdělávám snad pole pro tvé ovce?“

„Nezlob se,“ odpověděl klidně Ábel, „ovce ti žádnou škodu neudělaly. Z mých ovcí máš užitek. Nejíš jejich maso? Neoblékáš se do jejich vlny?“

Sed anstataŭ respondi Kaino levis ŝtonon. Larĝfore estas neniuj, li pensis, mi mortigos Habelon kaj neniuj scios tion. Kaj Kaino batis Habelon per ŝtono kaj Habelo defendis sin. Kaino batis Habelon duafoje kaj triafoje. Li serĉis lokon, tra kie eskapas vivo de la homo. Li ankoraŭ ne sciis, kiel oni povas mortigi homon. Ĝis tiam neniuj prenis la vivon de iu ajn, kaj la morto ankoraŭ vizitis neniun homon.

Habelo estis pli juna kaj pli forta. Li sukcesis en la matĉo Kainon alterigi. Kaino sentis sian malvenkon kaj komencis peti:

"Ne batu min, frato."

Habelo lasis Kainon kaj Kaino leviĝis de la tero. Apenaŭ li denove staris, li ĵetis la ŝtonon, kiun li ankoraŭ ne forĵetis. Li frakasis la kapon de Habelo per la ŝtono kaj Habelo falis morta sur la teron.

Silente staris Kaino super la unua morto, elveninta liajn manojn. La sango de Habelo fluis sur argilon, kaj la krustiĝinta tera buŝo avida trinkis ĝin.

En tiu momento flugis tra la aero du birdoj kaj dume unu atakis la alian kaj mortigis ĝin. La mortinta birdo falis teren antaŭ Kaino. Ĝia kunulo descendis al ĝi malsupren, komencis piedgrati kaj kovris la mortan birdon per malpuraĵo kaj polvo. Kaino ekkomprenis. Li fosis kavon kaj entombigis sian mortintan fraton en argilon. Jen estiĝis la unua homa tombo.

Poste Kaino volis eskapi, sed stranga angoro kaptis lin kaj li ne povis forlasi la lokon. Tiam aperis la Eternulo kaj diris:

"Kaino, kie estas Habelo?"

"Mi ne scias," respondis Kaino, "mi ne gardas mian fraton."

"Kaino, Kaino," diriĝis la Eternulo, "mi aŭdas kriadon de la sango de Habelo, ĝi aŭdiĝas el la tero, sur kiun vi faligis lin. Ĉu vi pensas, ke mi ne vidis, ĉu vi pensas, ke mi ne aŭdis kaj ke vi povas trompi min? Pro via ago vi punitos. Vi vivos maltrankvilan kaj necertan vivon, urtikojn kaj kardojn naskos viaj kampoj, kaj ĉio, kion vi havos, estos necerta kaj malstabila kiel via vivo."

Ale Kain mŝto respondi zvedl kámen. Ŝiroko daleko nikdo nenŝ, pomyslil si, zabiju Ábela a nikdo se o tom nedovŝ. A Kain udeřil Ábela kamenem a Ábel se bránil. Kain udeřil Ábela podruhé a poťreťi. Hledal mŝto, kudy uniká z ĉlověka ŝivot. Nevěděl jeřťe, jak mŝže ĉlověka usmrtit. Do té doby nikdo nikoho nezbabel ŝivota a smrt jeřťe nenavřtŝvila ŝádněho ĉlověka.

Ábel byl mladřŝ i silněřŝ. Podařilo se mu Kaina v zápase povalit na zem. Kain ĉitil svou poráŝku a začal prosit:

„Neubliŝuj mi, bratře.“

Ábel pustil Kaina a Kain se zvedl ze země. Sotva stál opěť na nohou, mrřtil kamenem, který doposud neodhodil. Rozbil Ábelovi kamenem hlavu a Ábel klesl mrtev k zemi.

Mlĉky stál Kain nad první smrtŝ, která vyřla z jeho rukou. Ábelova krev stěkala na hlŝnu a okoralá ústa země ji laĉně pila.

V té chvíli leťeli vzduchem dva ptáci a v letu se vrhl jeden na druhého a usmrtil ho. Mrtvý pták dopadl na zem před Kaina. K ptáku se snesl jeho druh, dal se do hrabání a pŝikryl mrtvého ptáka hlŝnou a prachem. Kain pochopil. Vyhlobil jámu a pohřbil mrtvého bratra do hlŝny. To byl první lidský hrob.

Potom ĉtěl Kain utěci, ale zmocnila se ho zvlářtnŝ úzkost a nemohl z mŝsta. Tehdy se objevil Jahve a řekl:

„Kaine, kde je Ábel?“

„Nevŝm,“ odpověděl Kain, „nehlŝdám svěho bratra.“

„Kaine, Kaine,“ řekl Jahve, „slyřŝm volání Ábelovy krve, vycházi ze země, na kterou jsi ho srazil. Mysliřŝ, že jsem neviděľ, myslŝri, že jsem neslyřel a že mě mŝžeř oklamat? Za tvŝj skutek tě stihne trest. Budeř ŝit neklidnŝm a nejistŝm ŝivotem, kopřŝivy a bodláky budou rodit tvoje pole a všechno, co budeř mít, bude jako tvŝj ŝivot nejistě a nestálě.“

“Reganto de la mondo,” teruriĝis Kaino pro tio, kion li faris, “mi faris krimon kaj ĝi estas tiel peza, ke mi ne povas porti ĝin. Ĉiuj vivantaj estaĵoj kulpigos min, persekutos min kaj finfine batos min ĝismorte.”

“Ne, Kaino,” diris la Eternulo, “vi vivos sep generaciojn kaj vagos tra la mondo kun signo sur via frunto, per kiu ĉiuj vin rekonos. Dum sep generacioj neniun povos morte damaĝi vin.”

La Eternulo kreskigis sur la frunto de Kaino kornon. Hodiaŭ oni parolas pri la Kaina signo. Oni konsideras ĝin signo, per kiu markitas mava homo.

Maltrankvila vivo pelis Kainon de loko al loko, kaj kien ajn li venis, la tero tremis sub li kaj la bestoj vidante lin ekstremis. Nenie li trovis certecon, neniun lokon por halti, kaj ĉio, kion li akiris, forlasis lin antaŭ ol li povis ĝoji pri ĝi. Dum sep generacioj li vagis tra la mondo, kaj kiam la sepa generacio naskiĝis kaj kreskis, la tempo de Kaino plenumiĝis, kiel la Eternulo difinis por li.

Tiutempe iris ĉasi maljunulo kaj lia juna filo. La maljunulo ne havis bonan vidkapablon, sed li havis spertan manon, kiu sciis forte streĉi la pafarkan ŝnuron. La knabo vidis perfekte, sed li ne havis la forton tiri la pafarkon. Do ili iradis komune kaj la knabo diradis al sia patro, kie estas besto. Ankaŭ ĉifoje li diris al sia patro:

"Turniĝu tiudirekten, venas iu besto."

Patro etendis la pafarkan ŝnuron kaj lanĉis la sagon. La besto falis kaj ambaŭ rapidis inspekti la predon.

“Ĝi aspektas kiel homo,” miris la knabo, “sed ĝi havas kornon meze de la frunto. Kiel tio eblas?”

La patro kliniĝis super la predo kaj rekonis per la signo sur la frunto, ke li mortpafis per sia sago Kainon, sian prapatron.

Tiel Kaino pereis per perforta morto post maltrankvila vivo.

„Pane sveta,“ zhorzil se Kain toho, co učinil, „spáchal jsem zločin a je tak těžký, že ho neunesu. Všichni živí tvorové mi budou dávat vinu, budou mě pronásledovat a nakonec mě ubijí k smrti.“

„Ne, Kaine,“ řekl Jahve, „budeš žít po sedm pokolení a bloudit po světě se znamením na čele, podle kterého tě každý pozná. Po sedm pokolení ti nesmí nikdo smrtelně ublížit.“

Jahve dal na Kainově čele vyrůst rohu. Podnes se mluví o Kainově znamení. Myslí se tím znamení, kterým je poznamenán zlý člověk.

Neklidný život hnal Kaina z místa na místo, a kam přišel, tam se pod ním chvěla země a zvířata se třásla, když ho spatřila. Nikde nenacházel jistotu, nikde neměl stání a všechno, čeho nabyl, ho opouštělo dříve, nežli se z toho mohl radovat. Po sedm pokolení bloudil světem, a když se narodilo sedmé pokolení a vyrostlo, naplnil se Kainův čas, tak jak mu Jahve předpověděl.

V té době vyšel na lov starý muž s mladým synkem. Starý muž neměl dobrý zrak, ale měl zkušenou ruku, která dovedla pevně napínat tětivu luku. Chlapec znamenitě viděl, ale neměl sílu, aby napjal luk. Vycházeli proto spolu a chlapec říkal starému otci, kde je zvěř. I tentokrát řekl otci:

„Otoč se tím směrem, blíží se nějaké zvíře.“

Otec napjal tětivu luku a vypustil šíp. Zvíře padlo a oba spěchali prohlédnout si kořist.

„Vypadá jako člověk,“ divil se chlapec, „ale má uprostřed čela roh. Jak je to možné?“

Otec se sklonil nad kořistí a poznal podle znamení na čele, že svým šípem zastřelil Kaina, svého prapředka.

Tak zahynul Kain po neklidném životě násilnou smrtí.

PRI LA SENMEZURA DILUVO DE LA MONDO, NOA KAJ LIA ARKEO

Homoj multiĝis sur la tero, sed justeco, toleremo kaj amo kun ili ne multiĝis. Multiĝis maljusto, malamikeco kaj malamo. Frato prirabantis fraton, homo priminacis homon, kaj la juĝistoj, kiuj estu zorgantaj pri justo kaj la leĝoj, mem uzis perforton kaj misuzis sian potencon por turnadi la juston kaj leĝojn kontraŭ tiuj, kiuj ekmalplaĉis al ili.

En tiu tempo vivis justulo Noa. Li estis saĝa kaj helpis homojn. Li inventis rikoltilon kaj hakilon por faciligi al homoj labori sur la kampoj kaj en la arbaroj. Sed homoj ne konis dankemon. Ili mokis al Noa.

"Ne zorgu tiom pri ni," ili diris, "la Eternulo ankaŭ ne zorgas pri ni. Li sendas al ni el la ĉielo nur kelkajn gutojn da pluvo, kaj sen ili ni povas bone vivi. Ni havas sufiĉe da akvo sur la tero eĉ sen li."

Iliajn vortojn aŭdis la Eternulo kaj nubmieniĝis. Li vokis Noa, kiu tiam havis la aĝon de kvincent naŭdek kvin jaroj, kaj diris al li:

"Proksimiĝis la fino de la homaro. Homoj plenigis ĉian angulon de la tero per malbonaj agoj. Ili primokas eĉ la pluvon, kiun mi sendas el la nuboj. Mi atendis sufiĉe longe, sed nun venis la tempo. Mi punos ilin per tio, kion ili primokas. Mi sendos sur ilin tiom da akvo, ke ĝi prenos ilian spiron. Sed mi konservos vin kaj vian familion. Iru al la homoj kaj diru al ili, ke ili forlasu la krimojn, mi avertas ilin lastfoje. Se la vivo sur la tero ne ŝanĝiĝos en cent dudek tagoj, la homaron atingos puno."

Noa iris al la homoj kaj rakontis al ili tion, kion diris al li la Eternulo. Iuj ne aŭskultis lin, iuj ridis kaj neniu kredis al li.

Pasis cent dudek tagoj kaj nenio sur la tero ŝanĝiĝis, unuj subpremis aliajn kaj la vero valoris malpli ol unu sablograjno. Post cent dudek tagoj la Eternulo diris al Noa:

"Dehaku cedrajn trunkojn kaj faru el ilia ligno grandan keston, tricent funtojn longan, kvindek funtojn larĝan kaj tridek funtojn altan.

O NESMÍRNÉ POTOPĚ SVĚTA, NOEMOVI A JEHO ARŠE

Lidé se na zemi rozmnožili, ale nerozmnožila se s nimi spravedlnost, snášenlivost a láska. Rozmnožila se křivda, nepřátelství a nenávisť. Bratr loupil u vlastního bratra, člověk ohrožoval člověka a soudci, kteří se měli starat o právo a zákony, sami používali násilí a zneužívali své moci, aby právo a zákony obraceli proti těm, kteří se jim znelíbili. V té době žil spravedlivý člověk Noe. Byl moudrý a pomáhal lidem. Vynalezl srp i sekeru, aby lidem usnadnil práci na poli a v lese. Ale lidé neznali vděčnost. Posmívali se Noemovi.

„Nestarej se tolik o nás,“ říkali, „Jahve se o nás také nestará. Posílá nám z nebe jen pár kapek deště, a bez těch se obejdeme. Máme na zemi dost vody i bez něho.“

Jejich řeči uslyšel Jahve a zachmuřil se. Zavolal Noema, kterému tehdy bylo pět set devadesát pět let, a řekl mu:

„Přiblížil se konec lidstva. Lidé naplnili zlémi činy kdejaký kout země. Posmívají se i dešti, který sesílám z oblak. Dost dlouho jsem čekal, ale nyní se naplnil čas. Potrestám je tím, čemu se posmívají. Pošlu na ně tolik vody, až jim vezme dech. Ale tebe a tvou rodinu zachovám. Jdi k lidem a řekni jim, ať zanechají zločinů, naposledy je varuji. Jestli se do sto dvaceti dnů nezmění život na zemi, stihne lidstvo trest.“

Noe šel k lidem a vyprávěl jim, co mu Jahve oznámil. Někteří ho nevyslechli, někteří se smáli a nikdo mu nevěřil.

Uplynulo sto dvacet dní a na zemi se nic nezměnilo, jedni utlačovali druhé a pravda měla menší cenu než zrnko písku. Po sto dvaceti dnech řekl Jahve Noemovi:

„Poraz cedrové kmeny a z jejich dřeva postav velikou truhlu, tři sta stop dlouhou, padesát stop širokou a třicet vysokou.

Faru al ĝi pintan tegmenton, kaj obturu ĝin bone per peĉo, por ke eĉ ne guto da akvo eniru ĝin."

Kaj la Eternulo desegnis per la fingro, kiel Noa dividu la keston en tri etaĝojn, kiel li dividu ĝin en ĉambrojn, provizejojn kaj grenejojn.

"En ĉi tiun arkeon vi prenos vian familion kaj el ĉiuj bestoj, birdoj kaj insektoj po paro, kaj vi prizorgos manĝaĵojn por ili. Vi konservos en la arkeo ankaŭ plantsemojn."

Noa obeis kaj komencis kun siaj filoj dehaki arbojn kaj prepari nekutiman konstruaĵon. Homoj venadis kaj miris kaj demandis de Noa, kial li dehakas la cedrojn, kion li konstruas? Noa rakontis al ili la interparolon kun la Eternulo. Homoj nur balancis la kapojn kaj ne kredis al li.

Noa konstruis la arkeon, kaj kiam ĝi estis finita, alkuris ĝin diversaj bestoj. Noa elektis paron de ĉiu speco. Li donis al ĉiu lokon en unu el la tri etaĝoj de la arkeo, kiel difinis la Eternulo. La plej malsuprajn spacojn priligiĝis brutaro kaj faŭno, en la mezaj areoj nestis birdoj kaj en la plej altaj areoj loĝis homoj kaj ĉiaj etaj fibestoj, vermoj kaj cikadoj, papilioj kaj formikoj.

Fine Noa havis en la arkeo ĉiujn kreitaĵojn. Tiam ankaŭ Mensogo alrapidis kaj volis eniri la arkeon.

"Ne, mi ne povas kunakcepti vin," rifuzis Noa, "mi havas paron da ĉio en la arkeo, kaj vi estas sola."

Kaj Mensogo ekiris por trovi iun, kun kiu ŝi povus konsentiĝi por trovi ŝirmejon en la arkeo. Survoje ŝi renkontis Malbenon.

"Iru kun mi," alparolis ŝin Mensogo, "ni estos paro kaj ni povos kaŝi nin de la inundo en la arkeo de Noa."

"Bone, kaj kion vi donos al mi por tio?" demandis Malbeno. "Apartenos al vi ĉio, kion mi akiros," respondis Mensogo. Do Mensogo eniris la arkeon de Noa kun Malbeno, por ke ili supervivu la mondan diluvon. Kaj kion la Mensogo semas, laŭ la interkonsento rikoltas Malbeno.

La tago de kataklismo proksimiĝis. La Eternulo skuis la teron, la sunon ekvalis mallumo, la mondo skuiĝis ĝis siaj fundamentoj kaj fulmoj kaj tondroj anoncantis la komencon de pereco.

Udelej jí špiĉatou střechu a celou jí dobře utěsni smolou, aby do ní nevníkla ani kapka vody.“

A Jahve kreslil prstem, jak má Noe truhlu rozdělit na tři poschodí, jak jí má přehradit na komory, zásobárny a sýpky.

„Do této archy odveď svou rodinu a od všech zvířat, ptáků i hmyzu po páru a postaráš se o zásoby potravy pro ně. Do archy uložíš i semena rostlin.“

Noe poslechl a začal se svými syny kácet stromy a připravovat nezvyklou stavbu. Lidé přicházeli, divili se a ptali se Noema, proč kácí cedry, co bude stavět? Noe jim pověděl o rozmluvě s Jahvem. Lidé jen potřásali hlavami a nevěřili mu.

Noe postavil archu, a když byla hotova, seběhla se kolem ní rozličná zvířata. Od každého druhu vybral Noe po páru. Každému vykázal místo v jednom ze tří poschodí archy, jak určil Jahve. Nejdolejší prostory obýval dobytek a divoká zvěř, v prostředních prostorách hnízdili ptáci a v nejhořejších prostorách bydlili lidé a všelijaká nepatrná havěť, červi a cikády, motýli i mravenci.

Konečně měl Noe v arše všechny tvory. Tu přispěchala i Lež a chtěla také do archy.

„Ne, tebe nemohu vzít s sebou,“ odmítl jí Noe, „od všeho mám v arše po páru, a ty jsi sama.“

I vydala se Lež hledat někoho, s kým by se shodla, aby našla v arše přístřeší. Cestou potkala Kletbu.

„Pojď se mnou,“ oslovila jí Lež, „budeme do páru a můžeme se skrýt před potopou v Noemově arše.“

„Dobrá, a co mi za to dáš?“ otázala se Kletba. „Bude ti patřit všechno, co získám,“ odpověděla Lež. Tak vstoupila Lež s Kletbou do Noemovy archy, aby přežily i potopu světa. A co Lež zaseje, sklízí podle úmluvy Kletba.

Den pohromy se přiblížil. Jahve otrásl zemí, slunce se zastřelo tmou, svět se zachvěl v základech a blesky a hromy ohlašovaly počátek zkázy.

La akvofontoj subite fortiĝis kaj elpaŝis la bordojn, la akvo en la putoj leviĝis kaj superigis la randojn, kaj ĉiuj ĉielaj fenestroj malfermiĝis kaj elfalegis la diluva pluvo.

Noa kaj lia familio rifuĝis en la arkeon kaj la Eternulo fermis la enirejon post ili. Nun la homoj vidis, ke Noa pravis, avertante ilin. Ili alkuris la arkeon kaj ŝatus eniri. Tamen, la arkeo estis firme fermita. Do la homoj alportis hakilojn kaj kuregis al la arkeo por enhakiĝi en ĝin. En tiu momento la Eternulo ordonis al predobestoj ĵeti sin kontraŭ la homojn kaj forkurigi ilin.

La pluvo ne ĉesantis kaj pluvis dum kvardek tagoj kaj kvardek noktoj. La akvoj levis la arkeon de Noa kaj la ŝtormaj ondoj pelis ĝin tien kaj tien, skuante kaj turnante ĝin de flanko al flanko. Interne la leonoj muĝis pro angoro, la lupoj hurlis pro timo, la brutaro timegis, la birdoj albatis la flugilojn kontraŭ la muroj kaj Noa kaj lia familio, ĉiuj veis kaj ploris kaj timis.

La Eternulo aŭdis ilian kriadon kaj indulgiĝis. Li trankviligis la ondojn kaj sendis venton, kiu ne ŝtormis, sed malrapide sekigis la vastan akvonivelon, en kiu ŝanĝiĝis la mondo. Malaperis kampoj kaj urboj, bestoj kaj homoj. Ĉio estis englutita de multaj akvoj kaj morta silento regis super ili.

Pasis dek du monatoj antaŭ ol la arkeo denove tuŝis firman teron. Dum dek du monatoj homoj kaj bestoj vivis interne de grandega kesto, nur granda perlo pendanta de la plafono lumis al ili. Dum la tuta tempo Noa kaj liaj filoj manĝigis la bestojn tage kaj nokte, ĉar iuj bestoj serĉas manĝon tage kaj aliaj eliras por manĝi nokte.

Post dek du monatoj la arkeo kaptiĝis sur malprofundo, kaj tiu estis la pinto de la monto Ararato. Noa malfermis la tegmentolukon de la arkeo kaj aerigis korvon. La korvo forflugis kaj ne revenis. Ĝi trovis en la malprofundaj marĉaj akvoj tiom da putrantaj bestoj, ke ĝi ne apartiĝis de ili. Post ĝi Noa liberigis kolombinon. La kolombino flugantis la tutan tagon kaj vespere revenis al la arkeo, ĉar ĝi ne trovis sekan teron por ripozi. Noa etendis la manon el la lukto, la kolombino sidiĝis sur ĝin kaj li portis ĝin en sekuron. Li atendis pluajn sep tagojn kaj poste liberigis la kolombinon denove.

Prameny náhle zmohutněly a vykročily z břehů, voda ve studnách stoupala a vyvěřela přes okraj a všechna okna nebes se otevřela a vyřítily se z nich déšť potopy.

Noe se uchýlil s rodinou do archy a Jahve za nimi uzavřel vchod. Teď poznali lidé, že měl Noe pravdu, když je varoval. Seběhli se kolem archy a byli by se rádi dostali dovnitř. Archa však byla pevně uzavřena. I přinesli lidé sekery a hnali se k arše, aby si do ní prosekali cestu. V tu chvíli rozkázal Jahve šelmám, aby se vrhly proti lidem a obrátily je na útěk.

Déšť neustával a přelo čtyřicet dnů a čtyřicet nocí. Vody zvedly Noemovu archu a bouřlivé vlny ji hnaly hned sem a hned tam, kymácely jí a převracely ji z boku na bok. Uvnitř řvali lvi úzkostí, vlci strachy vyli, dobytek se plašil, ptáci tloukli křídly do stěn a Noe i jeho rodina, všichni bědovali a plakali a měli strach.

Jahve slyšel jejich nářek a ustrnul se. Uklidnil vlny a poslal vítr, který nebouril, ale zvolna vysušoval obrovskou vodní hladinu, v níž se proměnil svět. Zmizela pole i města, zvířata i lidé. Všechno pohltily spousty vod a mrtvé ticho panovalo nad nimi.

Dvanáct měsíců trvalo, nežli se archa opět dotkla svým dnem pevné země. Po dvanácti měsících žili lidé a zvířata uvnitř obrovité truhly a svítla jim jenom veliká perla zavěšená na stropě. Noe a jeho synové po celou tu dobu krmili zvěř ve dne i v noci, neboť některá zvířata hledají potravu ve dne a jiná vycházejí za potravou v noci.

Po dvanácti měsících se zachytila archa na mělčině a mělčina byl vrchol hory Ararat. Noe otevřel světlík archy a vypustil krkavce. Krkavec odletěl a nevrátil se. Našel v mělkých močálovitých vodách tolik tlejících zvířat, že se od nich neodloučil. Po něm vypustil Noe holubici. Holubice létala celý den a navečer se vrátila zpátky do archy, neboť nenalezla suchou zemi, na které by si odpočinula. Noe vztáhl ze světlíku ruku, holubice mu na ni usedla, a on ji na ruce odnesl do bezpečí. Počkal ještě sedm dní a pak vypustil holubici znovu.

Ĉifoje ĝi alflugis en la arkeon vespere, portante en sia beko olivbranĉon kun verdaj folioj. Noa ĝoje bonvenigis la bonan senditon, kiu alportantis la novaĵon pri la fino de la terura diluvo. Ekde tiuj tempoj, la kolombino memorigas homojn pri la fino de suferoj kaj la sopiratan pacon.

La tero nun rapide sekiĝadis. La fontoj kaj riveroj revenis al siaj bordoj kaj la akvo en la putoj descendis. Noa kun la filoj deprenis la tegmenton de la arkeo, liberigis la birdojn kaj donis liberon al la bestoj. Fine li mem kun sia familio supreniris la teron, kiu estis tiel longe senhoma.

Unue Noa konstruis altaron por danki al la Eternulo per brulofero. Li oferis brutojn kaj ŝafojn kaj kaprojn, kaj ankaŭ kolombojn kaj turtojn. La odoro de la brulofero ascendis kun la fumo ĝis la ĉielo. La Eternulo kun plezuro flaris la agrablan odoron kaj diris al Noa:

